La Hodiaŭa Ĵurnalo

2018-01-25 n-ro 427

# Vundoj suferitaj dumtage pli rapide cikatriĝas



Gravaj punktoj por bone koni la Mondan Ekonomian Forumon en Davos

Venezuela Konstitucia Asembleo aprobis pli fruan prezidentan elekton

La plej granda ŝarko iam ajn

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin [Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopiniajn kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

Mike Pence: Lanĉo de plano pri mezorienta paco dependas de Palestino
*Membroj de arabaj politikpartioj en la parlamento protestis kontraŭ lia starpunkto p. 03*

Venezuela Konstitucia Asembleo aprobis pli fruan prezidentan elekton
*Antaŭ la 30-a de aprilo p. 03*

Demokratia Respubliko Kongo: almenaŭ kvin mortintoj en Kinŝaso
*Ampleksa mobilizado p. 04*

Gravaj punktoj por bone koni la Mondan Ekonomian Forumon en *Davos*
*Pli ol 2 500 ĉeestantoj el 110 landoj p. 05*

Vundoj suferitaj dumtage pli rapide cikatriĝas
*Ol tiuj, kiuj okazis nokte p. 06*

La monstro datrevenas: 200-jara *Frankenstein*
*Lanĉita unuafoje en la jaro 1818 p. 07*

La plej granda ŝarko iam ajn
*Megalodon p. 08*

Hodiaŭe
*István Fekete; Robert Burns; Vladimir Visockij; kaj Palaco p. 10*

# Mike PENCE: Lanĉo de plano pri mezorienta paco dependas de Palestino

Usona Vicprezidento Mike PENCE, vizitanta en Israelo, marde [23 jan 2018] diris al raportistoj, ke Palestino decidos, kiam Usono lanĉu la planon pri paco de Mez-Oriento. PENCE diris, ke Usono delonge subtenas komunikadon kun koncernaj landoj por starigi kadron de paco, tamen tio dependas de Palestino, kiam ĝi revenos al la tablo de intertraktado.




PENCE faris la rimarkojn dum prelego en la Israela parlamento. Membroj de arabaj politikpartioj en la parlamento protestis kontraŭ lia starpunkto. Iuj el ili priskribis lin kiel malplaĉan personon, iuj laŭte kriis "Jerusalemo estas la ĉefurbo de Palestina ŝtato", kaj aliaj forlasis la kunvenon.

Israelo estis la tria haltejo de la vojaĝo de PENCE al Mez-Oriento. Antaŭe li vizitis Egiption kaj Jordanion, du gravajn aliancanojn de Usono en Mez-Oriento.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Venezuela Konstitucia Asembleo aprobis pli fruan prezidentan elekton

La Venezuela Konstitucia Asembleo marde [23 jun 2018] adoptis rezolucion pri pli frua okazigo de prezidenta elekto antaŭ la 30-a de aprilo.



La unua vicprezidanto de la reganta Unueca Socialista Partio kaj membro de la Konstitucia Asembleo Diosdado CABELLO marde prezentis al la Konstitucia Asembleo mocion pri plifruigo de la prezidenta elekto antaŭ la fino de aprilo por respondi al la senĉesaj sankcioj de okcidentaj landoj kontraŭ Venezuelo.

Li emfazis, ke en la reganta partio estas nenia dividiĝo, kaj prezidento Nicolas MADURO serĉos pluan oficperiodon kiel sola kandidato de la reganta partio. Li petis la naciajn elekt-instituciojn sin prepari por la elekto kaj fiksi precizan daton de la elekto.

Poste la Konstitucia Asembleo adoptis la mocion de CABELLO post diskuto kaj konkludis rezolucion prezentotan al la Nacia Elekt-Komitato.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Demokratia Respubliko Kongo: almenaŭ kvin mortintoj en Kinŝaso

La "Laika komitato de kunordigado" alvokis al nova ampleksa mobilizado, pasintan dimanĉon la 21-an de januaro 2018, postulante de Prezidento Joseph KABILA, kaj li foriru kaj respektu sian devontiĝon ne kandidati je nova mandato, substrekas la novaĵagentejo *Anadolu Agency*.



La korespondanto de tiu retejo informis, ke la policistoj estis amase deplojitaj en la ĉefaj stratoj de la ĉefurbo de tiu lando de Centr-Afriko, Kinŝaso, ekde dimanĉmatene. Li aldonis, ke bariloj estis krome starigitaj en pluraj stratoj de la urbo, kie la sekurecaj fortoj efektivigis identeckontrolojn.

La korespondanto de *Anadolu* raportis, ke la interrompo de Interreto komenciĝis sabate je la loka horo 23:45, sen komuniki averton al la uzantoj. Ne liverante detalojn nek pri la kialoj de la interrompo, nek pri la dato de rekonektado, respondeculo de la franca kompanio de telekomunikado *Orange*, kiu operacias en DRK, simple indikis: «Ni ne plu provizas Interreton. Ĝi estis interrompita»

Kvankam la misio de UN en DRK (MONUSCO) petis de la kongaj aŭtoritatoj, ke ili respektu la rajton de la civitanoj al manifestacio, la aŭtoritatoj de Kinŝaso tamen malpermesis novajn marŝadojn de dimanĉo. Siaflanke, la ĉefo de la islama komunumo en DRK, Cheik Ali MWINYI petegis de Kinŝaso, ke ĝi ne subpremu la marŝadojn de la katolikoj, opiniante, ke ili konformas al la konstitucia juro. Tiuj alvokoj tamen ne estis aŭdataj, ĉar almenaŭ kvin homoj mortis , laŭ la BBC.

Kial la reĝimo de KABILA malfunkciigis la Interret-aliron? La respondon liveras reago de la loĝantoj de Kinŝaso: laŭ ili, tiu ago estas evidenta volo de la reĝimo silentigi tiun ribelon, kiu ampleksiĝas. Laŭ la kinŝasanoj, ĉar la ŝtatestro scias, ke Interreto ebligas «fortegan mobilizadon, en rekorda tempo», «la nura rimedo por subpremi la kontestadon, estis interrompi la aliron al ĝi». Ĉu tio sufiĉos por kvietigi la koleron de la kontraŭ-kabila movado?

Neniam Milito Inter Ni

# Gravaj punktoj por bone koni la Mondan Ekonomian Forumon en *Davos*




La 23-an de januaro inaŭguriĝis la jarkunveno de la Monda Ekonomia Forumo en Davos, Svislando, kun preskaŭ 3 000 ĉeestantoj. Ĉi-jara temo estas "Krei komunan estontecon en partiĝa mondo". Pli ol 2 500 ĉeestantoj el 110 landoj, inkluzive de ŝtatgvidantoj, komercistoj, reprezentantoj el internaciaj institucioj, socia, akademia, amaskomunikila kaj arta rondoj.

**Tagordoj**

1. Tagordo pri la **tuta mondo**: subteni ĉiujn mekanismojn por plibonigo de monda regado kaj gravajn procezojn pri plurflankaj kunlaboro. Ekzemple, la Celoj de UN por Daŭripova Evoluigo;

2. Tagordo pri **geopolitiko**: alvoki koncernajn politik-decidantojn kaj fakulojn diskuti pri prevento de geopolitikaj demandoj kaj rapida reago;

3. Tagordo pri **ekonomio**: subteni plurflankajn kunlaborojn por puŝi daŭripovan kaj inkluzivigan ekonomian disvolvadon por respondi nesufiĉan kreskon, malkreskon de produktado kaj teknikajn barojn;

4. Tagordo pri **regionoj**: diskuti pri la influo de sociaj kaj ekonomiaj transformiĝoj en diversaj regionoj;

5. Tagordo pri **industrio kaj komerco**: servi por krei novan komercan ekosistemon, helpi al entreprenoj kaj registaraj gvidantoj pretiĝi por la kvara industria revolucio;

6. Tagordo pri **estonteco**: per interŝanĝo de ideoj kaj novaj eltrovaĵoj, antaŭvidi gravajn influajn faktorojn, kiuj eble renovigos la mondan sistemon.

**Gravaj punktoj**

*1. Rekorda nombro de ĉeestantaj ŝtatgvidantoj*

Ĉi-jare estas rekorda nombro de ĉeestantaj ŝtatgvidantoj. Ĉeestas preskaŭ 70 ŝtatestroj kaj registaraj gvidantoj, inkluzive de Itala Ĉefministro Paolo GENTILONI, Franca Prezidento Emmanuel MACRON, Brita Ĉefministro Theresa MAY, Germana Kanceliero Angela MERKEL, Kanada Ĉefministro Justin TRUDEAU kaj aliaj.

*2. Atendo de ĉina projekto*

Ĉi-foje ankaŭ la nombro de ĉinaj ĉeestantoj trarompis la rekordon, kun entute 136 ĉeestantoj.

David AIKMAN, ĉefreprezentanto de Ĉinio en la Monda Ekonomia Forumo, diris, ke temoj ĉi-jare rilatas al la disvolvado de Ĉinio en la estonteco. En iuj teknikaj kampoj de emerĝantaj industrioj, kie Ĉinio povas ludi la gvidan rolon, la mondo esperas aŭdi la voĉon de Ĉinio.

*3. Ĉeesto de la unua usona prezidento en Davosa Forumo en 18 jaroj*

Donald TRUMP ĉeestos la forumon. Antaŭ 18 jaroj Bill CLINTON ĝin ĉeestis. Nun Donald TRUMP estas tiu kiu sekvis CLINTON por ĉeesti la forumon.

*4. Virinaj prezidantoj*

Ĉiuj sep konfederaciaj prezidantoj de la forumo estas virinaj.

Ili estas prezidanto de la Internacia Mona Fonduso Christine LAGARDE, ĝenerala direktoro de la firmao IBM Ginni ROMETTY, norvega ĉefministro Erna SOLBERG, ĝenerala sekretario de Internacia Konfederacio de Sindikatoj Sharan BURROW, ĝenerala direktoro de la franca ENGIE-grupo Isabelle KOCHER, direktoro de Eŭropa Organizo por Nuklea Esploro Fabiola GIANOTTI, kaj iniciatinto kaj prezidanto de Mann-Deshi-Fondaĵo Chetna SINHA.

*5. Plej seriozaj risk-eventoj*

Antaŭ nelonge la Monda Ekonomia Forumo publikigis Raporton pri Mondaj Riskoj 2018, dirante, ke eventoj pri ekstrema vetero, natura katastrofo, interreta atako, datenaj fraŭdo aŭ ŝtelo, malrapidiĝo de klimata ŝanĝo kaj fiaska respondo kaj traktado, grandskala nevola migrado kaj aliaj fariĝis la plej seriozaj riskoj alfrontataj de la mondo en 2018.

LIU Zijia
El Popola Ĉinio

# Vundoj suferitaj dumtage pli rapide cikatriĝas

Vundoj kaj brulvundoj suferitaj dumtage cikatriĝas pli facile ol tiuj, kiuj okazis nokte. Informis pri tio sciencistoj el MRC *Laboratory of Molecular Biology, Cambridge*. Iliaopinie tio povas ligiĝi kun la funkciado de la biologia horloĝo. Siajn konkludojn ili tiris post la ekzameno de 118 pacientoj en brulvundaj fakoj de britaj publikaj hospitaloj. Evidentiĝis, ke brulvundoj kreiĝintaj nokte bezonis 28 tagojn por cikatriĝi, dum tiuj suferitaj dumtage - nur 17 tagojn.



Tio povas ligiĝi kun la funkcianta en la homaj ĉeloj mekanismo mezuranta la tempopason, do biologian horloĝon. La laboratoriaj esploroj ebligis difini, ke la propreco de la haŭtoĉeloj, t.e. fibroblastoj ŝanĝiĝas en la 24-hora ciklo. Ili kiel la unuaj reagas je lezo, translokiĝante al la lezita loko por fermi la vundon. Tage ili reagas rapide, sed nokte ili noteble malrapidiĝas pro malpli granda aktiveco de la proteinoj influantaj ilian movkapablon. Laŭ la britaj sciencistoj, tiu kono povos esti utiligita por plibonigi la rezultojn de kirurgiaj operacioj.

Kelkaj medikamentoj, ekzemple kortizolo, nuligas la „horloĝon” de unuopaj ĉeloj. Tiu kono povas esti utiligita kaze de kirurgiaj operacioj okazigataj nokte. Aliflanke la biologia horloĝo de ĉiu homo funkcias iom alie, tial individua elekto de konforma operacihoro povas gravi. Ekzemple la vundokuracado en la brita publika sanservo konsumas ĉirkaŭ 5 miliardojn da britaj pundoj jare, tial plibonigo de la vundokuraca efiko ligiĝus kun signifaj ŝparoj.

Pola Retradio

# La monstro datrevenas: 200-jara *Frankenstein*

En januaro 2018 la mondo rememoras unu el la plej simbolaj figuroj de la monda literaturo kaj kinoarto: la verko "*Frankenstein, aŭ la Moderna Prometeo*", lanĉita unuafoje en la jaro 1818, en Britujo. La aŭtorino, Mary SHELLEY, verkis ĝin dum la jaroj 1816 kaj 1817, kaj estis nur 20-jaraĝa, kiam la verko publikiĝis unuafoje. La unua eldono, kiu konsistis el nur 500 ekzempleroj, tamen ne aperigis la nomon de la verkintino. La sukceso estis tuja kaj furora, kaj sennombraj eldonoj sekvis. Definitiva teksto aperis poste, kun ŝanĝoj.



Kuriozaj estis la cirkonstancoj, en kiuj ŝi komencis la verkadon de tiu klasikaĵo. Dum somerumado kun sia tiama fianĉo, la fama poeto Percy SHELLEY, en Svisujo, kune kun la amiko (ankaŭ poeto) Lord BYRON, la vetero fariĝis malbona. Ĉar la grupo devis resti enfermita en la gastejo, unu el ili proponis, ke ĉiu verku rakonton en la ĝenro "fantoma", aŭ "horora". Tiam ŝi ekhavis la ideon verki romanon pri medicinstudento, kiu vivigis homan estulon.

Pro la influo de multaj kinoversioj de la rakonto, multaj homoj ankoraŭ pensas, ke *Frankenstein* estas la nomo de la kreita monstro. Fakte, en la libro, Viktor FRANKENSTEIN estas la nomo de la kreinto, kiu estis studento de natursciencoj. La kreito mem ne havas propran nomon, kaj estas menciita ĉiam kiel "Monstro", "Demono", "Malbenito", "Kreito". Ĝi havis flavan haŭton, naŭzan aspekton kaj altan staturon.

La unua filmo farita surbaze de tiu libro datiĝis de 1910. Multaj aliaj sekvis, ĉiam emfazante la "hororan" flankon de la rakonto. Tamen, redukti *"Frankenstein"* al hororaĵo estas neĝuste kompreni ĝin. La tuta signifo devenas de la helena mitologio: Prometeo estis Titano, kiu ŝtelis la fajron de la dioj kaj transdonis ĝin al la homoj. Temas pri la homa revo fariĝi dio. La plej valora kreaĵo de dioj estas la vivo mem, kaj la juna FRANKENSTEIN sukcesis krei homecan vivulon, eĉ se malfeliĉan kaj vivantan marĝene de la homaro. Tamen, la Kreito demandas pri la signifo de la vivo, de la destino, pri la rilatoj inter kreinto kaj kreito. Ĝi havas homajn sentojn kaj angorojn. Kruelaĵoj okazas pro malharmonio en la "animo" de la Monstro, same kiel okazas kun la "normalaj" homoj.

En Esperanto ekzistas traduko de la jubileanta verko, farita surbaze de la unua eldono, de 1818. Ĝi estas disponebla en interreto (vidu) . Certe ĝi meritas viziton.

Paŭlo Sergio VIANA
Esperanta Retradio

# La plej granda ŝarko iam ajn

La blanka ŝarko ne ĉiam estis la plej danĝera fiŝo de la maro. Pratempa ŝarko ŝanĝis trifoje sian grandecon.



Post la morto de la lasta dinosaŭro, antaŭ 65 milionoj da jaroj, mamuloj kaj birdoj floris ĉie sur la Tero. Tio ne signifas tamen, ke la vivo en la maro haltis. Eĉ kelkaj mamuloj vagadis denove en la direkton de la akvo. Tiuj adaptis sin por poste iĝi delfenoj kaj balenoj, sed ilin atendis granda danĝero. Antaŭ 23 ĝis 2,6 milionoj da jaroj vivis *Megalodon*, la plej granda ŝarko iam ajn. Per korpo de averaĝe 10,5m kaj dentoj de 18cm, ĝi ĉasis malgrandajn balenojn kaj estis la plej danĝera predanto en sia medio. La rego de *Megalodon* ne daŭris tiom longe tamen. Malgraŭ la longa historio de ŝarkoj, kiu daŭris pli ol 400 milionoj da jaroj, *Megalodon* nur eltenis ĉirkaŭ 20 milionojn.

**Dentoj**

Paleontologoj trovis multajn fosiliojn de *Megalodon*, sed neniujn ostojn, la plejparto el ili estas dentoj. Tio sekvas el la fakto ke la skeleto de ŝarko konsistas el kartilago. Kutimaj ostoj, kiujn oni trovas en mamuloj, sed ankaŭ en la plejparto de fiŝoj, konsistas el tre dura materialo, kiu malrapide digestiĝas de bakterioj. Kontraste, la kartilago en la skeletoj de ŝarkoj kaj rajoj preskaŭ tuj post la morto disfalas kaj tute malaperas post unu aŭ kelkaj semajnoj. La nura parto de ŝarko, kiu ja bone konserviĝas, estas la dentoj. Feliĉe ili havas amason.

Dum la tempo de *Megalodon*, la dentaroj de ŝarkoj jam havis tre interesan kvaliton. Malkiel homoj, kiuj havas nur du dentarojn dum la tuta vivo, ŝarkoj povas renovigi la dentaron konstante. La dentoj troviĝas en pluraj vicoj kaj kiam unu elfalas, la sekva povas tuj preni la lokon de la antaŭa. Dum la tuta vivo, ŝarko povas perdi milojn da dentoj, kio igas la ŝancon ke almenaŭ unu el ili fosiliiĝas sufiĉe granda. Kiom facile ili fosiliiĝas kaj kiom multe da ili estis perditaj do klarigas kial ni konas la beston preskaŭ nur laŭ la dentoj.

La dentoj de *Megalodon* facile rekoneblas, ĉar neniu ŝarko havas eĉ iomete similajn dentojn. Unue, ili estis gigantaj. Ili povis iĝi 18cm kaj estis tre dikaj, kompare al tiuj de modernaj ŝarkoj. La diferencoj estas tre klaraj, eĉ se oni komparas *Megalodon* al la blanka ŝarko, ĝia plej proksima parenco. Laŭ la rando de la dentegoj videblas etaj strukturoj, kiuj similias al tranĉilo. Tiuj igas la damaĝon kiun la dento povas krei multe pli granda. Fakte, eĉ post milionoj da jaroj oni povas vundegi sin se oni ne tenas la denton ĝuste, aŭ per bonaj gantoj. Fine, ankaŭ la materialo el kiu la dentoj konsistas estas malsama. Al dentopasto oni ofte aldonas natrian fluoridon por preventi kariojn. Ankaŭ la dentoj *Megalodon* enhavis fluoridon en la formo de fluorapatito. Tiu mineralo daŭre troveblas en la dentoj de modernaj ŝarkoj, sed sur surface. *Megalodon* havis fluorapatiton en la tuta dento, kio igis ilin eĉ pli fortaj. Sciencistoj pensas ke tiu lasta diferenco estas konsekvenco de malpli alta kvanto da fluorido en la oceanoj kompare al la tempo de *Megalodon*. Specife por ŝarkoj, kiuj konstante renovigas la dentaron, tio povas esti problemo.

**Grandeco**

Sen kompleta skeleto, paleontologoj ne povas konsenti pri kiom granda *Megalodon* fakte estis. Oni certas ke la fiŝego estis multe pli granda ol la blanka ŝarko. Tio estas klara pro la dentoj, kiuj multe pli grandas, sed ankaŭ pro la dieto. Oni trovis restaĵojn de balenoj kiuj estis atakataj de *Megalodon* kaj havis ŝirojn de pluraj centimetroj en la ostoj. Nur besto kun tiom grandaj dentoj povus tiom damaĝi balenon.

La rilatumoj inter malsamaj partoj de la korpo povas esti bonaj indikoj pri la grando de la tuto. Se oni komparas la grandecon de aliaj ŝarkoj al ties dentoj, oni povas uzi tiujn informojn por krei minimuman kaj maksimuman divenon pri la grandeco de nekonata ŝarko. La grandeco de *Megalodon* ŝanĝiĝis konstante, pro tio ke malsamaj sciencistoj proponis malsamajn modelojn pri la rilatumo inter la grandeco de la dentoj kaj la longeco de la ŝarko kaj ili estis tre kritikemaj. En 1909, ekzemple, la Usona sciencisto Bashford Dean provis rekonstrui la makzelon de la bestego. Li povis facile sidi ene de la grandega makzelo kaj konkludis ke la tuta besto devus esti pli-malpli 30m. Poste oni eltrovis ke Dean uzis multe tro da kartilagon sur ambaŭ duonoj de la makzelo, kio igis ĝin multe tro alta. Kompreneble tio ankaŭ pruvis ke lia estimo de la longeco ne povas ĝusti. Aliaj sciencistoj provis krei modelojn en kiuj la grandeco de la ŝarko kaj la dentoj estis linie dependaj. Unu el tiuj modeloj diras ke ĉiu centimentro da larĝeco de dento korespondas al 1,4m da ŝarko. Tiaj modeloj estas danĝeraj tamen, pro tio ke la dentoj ne nepre same rapide kreskas kiel la korpo kaj pro tio ke tiaj estimoj ofte estas bazitaj sur la blanka ŝarko, kiu eble malpli similas al *Megalodon* ol ni pensas. Hodiaŭ la plejmulto de paleontologoj kredas ke *Megalodon* estis maksimume 18m kaj averaĝe 10,5m. Tio estas daŭre multe pli granda ol blankaj ŝarkoj, kiuj maksimume iĝas 6.1m. Oni ne scias tamen, ĉu ĉiu *Megalodon* estis same granda. Ĝi vivis preskaŭ ĉie kaj malsamaj medioj povus influi la grandon de la besto.

Tiom grandaj makzeloj ankaŭ igis la mordon de *Megalodon* nekredeble forta. Laŭ komputilaj modeloj de la besto kaj la fosilioj de la viktimoj, oni sukcesis estimi la forton per kiu *Megalodon* mordis. La minimuma kaj maksimuma pritakso de la mordoforto de *Megalodon* estas 108 514 N kaj 182 201 N. Tio sufiĉas por facile mordi buson, aŭ por levi objekton de 11 000 kg ĝis 18 500 kg. Aldone, oni pensas ke *Megalodon* povis ĵeti la kapon tien kaj reen dum la mordo por pli bone ŝiri la karnon. Tiel la predo spertas eĉ pli da forto. Laŭ tiuj pritaksoj, *Megalodon* havis la plej fortan mordon iam ajn oficiale priskribitan. Ĝia forto estis preskaŭ dufoje tiom granda ol tiuj de la plej granda krokodilo, *T. Rex* kaj la blanka ŝarko kombine.

**Formorto**

Paleontologoj ne konsentas pri kiel tiom sukcesplena besto povis formorti. *Megalodon* estis la plej danĝera predanto de la mondo kaj vivis en tre vasta regiono. Oni tamen trovis diversajn indikojn kaj havas kelkajn teoriojn, kiuj verŝajne havas kombinan efikon. Plej gravaj estis unue ke *Megalodon* ekhavis konkurencon. *Megalodon* ja estis tre granda, sed aliaj malpli grandaj bestoj kiel orcinoj kaj aliaj ŝarkoj estis multe pli efikaj. Ĉasi, naĝi kaj aliaj agoj kostis malpli da energio al tiuj bestoj, kio igis la ŝancon de travivi pli alta ol tiu de *Megalodon*. Alia grava faktoro estas tiu de la klimato. Oni kredas ke *Megalodon* formortis en periodo dum kiu la klimato sur la tuta Tero malvarmiĝis. La balenoj kiujn *Megalodon* uzis por nutri sin iris al malpli varmaj regionoj, kie ili plej facile travivis. *Megalodon* estis multe malpli bone adaptita por travivi en malvarmaj medioj kaj devis resti en malkreskanta varma regiono. Tiel grandega fonto de nutraĵoj malaperis kaj *Megalodon* ne povis sufiĉe rapide adapti sin.

Kiel ajn *Megalodon* malaperis, estas bona ekzerco por imagi la ekstremojn de biologio. Kompreni la ŝarkegon estas esenca por bone kompreni la ekosistemojn en kiuj ĝi vivis kaj la rolon kiun ĝi ludis en la historio de aliaj organismoj kiel balenoj. Aldone, la giganteco de *Megalodon* donas al ni novan perspektivon por rigardi la bestojn, kiuj vivas nuntempe. Sekvafoje kiam la ĉefkaraktero de filmo batalas ŝarkon, oni do ne bezonas esti tro impona. Almenaŭ la kompatindulo ne frontas *Megalodon*.

Frank van Hertrooij
scivolemo.wordpress.com
Kun subteno de ISAE



## István FEKETE


**István FEKETE [iŝtvAn], hungare FEKETE István, Esperante Stefano FEKETE estis populara hungara verkisto. István FEKETE naskiĝis la 25-an de januaro 1900 en *Gölle*. Li mortis la 23-an de junio 1970 en Budapeŝto.**

**En Esperanto aperis: *Vuk*.**

**Vikipedio**

---

## Robert BURNS



**Robert BURNS (naskiĝis la 25-an de januaro 1759 en *Alloway*, *Ayrshire*, mortis la 21-an de julio 1796 en *Dumfries*) estis skota poeto.**

**En Esperanto aperis pluraj tradukoj.**

**Vikipedio**

---



## Vladimir VISOCKIJ

**Vladimir Semjonoviĉ VISOCKIJ (ruse** Влади́мир Семёнович Высо́цкий**) (naskiĝis la 25-an de januaro 1938 en Moskvo, mortis la 25-an de julio 1980 samloke) estis rusa poeto, muziksto, bardo kaj aktoro.**

**En Esperanto aperis pluraj tradukoj.**

**Vikipedio**

---



## Bildo de la tago

**La Arabeska Ĉambro de la**

**Palaco de Catherine,**

**Sankta Petersburgo, Rusio.**

**Vikipedio**